

## Stipendio Ivo Lapenna

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 januaro 30 kaj februaro 01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ du agadoj ligitaj al la memoro de Ivo Lapenna altiros nian atenton. Unue en la revuo "Literatura Foiro", numero 133-a, estas anoncita **stipendio Ivo Lapenna**, kiu celas subvencii disertaciojn. Jen ni citas tiun artikolon:

A.- "Konkreta paŝo subtene al la studentoj elektontaj esperanton aŭ interlingvistikon por siaj doktoriĝoj estis farita lastatempe de Fondaĵo Ivo Lapenna. Dum kunsido en Slovakio la respondeculoj de Fondaĵo Ivo Lapenna ĵus aprobis regularon, kiun ni volonte publikigas. La sumoj je dispono estas modestaj sed, precipe en orienta Eŭropo kaj en la Tria Mondo, ili povas konsistigi multon pli ol simbolan agnoskon. Interesatoj bonvolu sin adresi al d-ro Klaus Perko en Graz, Aŭstrio."

Cl.- Jen la teksto de tiu regularo:

A.- "1-e. Fondaĵo Ivo Lapenna subvenciadus el la interezoj de sia kapitalo, en formo de stipendio, kiel eble plej multajn disertaciojn je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licenciĝoj), kiuj temas pri esperantologio kaj aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko, kaj estas ellaboritaj en la spirito de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

Cl.- "2-e. Por ricevi eventualan stipendion la aŭtoro de la disertacio devas mem kandidatiĝi, sendante al la adreso indikita de Fondaĵo Ivo Lapenna du ekzemplerojn de sia faklaboraĵo. Aneksa, la aŭtoro devas liveri biografion kaj la precizajn datojn kaj noton de akcepto de la disertacio: nur efektive defenditaj disertacioj estos konsiderataj de Fondaĵo Ivo Lapenna. Ne estos subvencieblaj tiuj antaŭaj al 1990.

A.- "3-e. Fondaĵo Ivo Lapenna submetos la disertacion al la ekzameno de almenaŭ du fakuloj kun akademia titolo (sed ne necese katedranoj), scipovantaj la lingvon en kiu la disertacio estas verkita. Surbaze de ilia juĝo Fondaĵo Ivo Lapenna asignos la stipendion, maksimume ses monatojn post la livero.

Cl.- "4-e. La stipendio varias laŭ la disponeblo de la kapitalo, la nombro de la ekzamenitaj disertacioj kaj la efektiva scienca valoro de la disertacio mem. La minimuma sumo estos cent svisaj frankoj, la maksimuma kvincent.

A.- "5-e. La stipendiulo havos la moralan devon mencii en la disertacia frontispico la asignon de Stipendio Ivo Lapenna.

Cl.- "6-e. La ricevita ekzempleroj restos posedaĵo de Fondaĵo Ivo Lapenna: unu restos en la arkivo de Fondaĵo Ivo Lapenna, la alia estos deponita ĉe Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en Svislando, en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

A.- "7-e. Kandidatiĝo al la stipendio implicas la kompletan akcepton de ĉi tiu regularo."

Cl.- Inter la aŭdantoj de tiu ĉi novaĵo troviĝas eble studentoj redaktantaj disertacion. Ili do sciuj, ke subvencio estas ricevebla. Sed eble ankaŭ troviĝas donacemuloj, kiuj apogas la koncernan agadon kaj iel ŝatus konkretigi sian admiron al Ivo Lapenna kaj ankaŭ sian deziron kuraĝigi studentojn elekti disertacian temon en rilato kun esperanto aŭ interlingvistiko. Tiam ili helpu per donaco al la kresko de la kapitalo de Fondaĵo Ivo Lapenna. Al ambaŭ tipoj de geaŭdantoj ni estas pretaj sendi la adreson de d-ro Klaus Perko, kiu prezidas ĉi tiun fondaĵon.

A.- Ni ricevis alvokon por alia agado ligita ankaŭ al la memoro de Ivo Lapenna.

Cl.- E1 Israelo d-ro Norman BERDICHEVSKY, en ZIKHRON JAAKOV, sendis nefermitan leteron al la redakcioj de esperanto-organoj. Li alvokas la komitaton de UEA rehonori Ivon Lapenna. Sed tion li faras per letero vere ne inda je la honoro mem de la prezidinto de UEA. Ni troviĝas antaŭ monumento de neklereco lingva.

A.- Se unu homo kritikis la fuŝan uzon de esperanto fare de nekompetentuloj, tiu estas Ivo Lapenna mem.

Cl.- Tial ni opinias, ke la koncerna letero devas esti severe kritikita. Unue Norman BERDICHEVSKY titolas ĝin:

A.- "Malfermita Letero."

Cl.- Se li estus malfermita sian PIV-on, li estus lerninta, ke en esperanto oni diras

A.- Nefermita Letero

Cl.- aŭ prefere

A.- Publika Letero.

Cl.- Kiam vi ricevas leteron, ĝi estas ĝenerale fermita, kaj vi unue malfermas ĝin. Tiam ĝi estas malfermita letero. Tion ne volis skribi Norman BERDICHEVSKY. La tuta letero plenas je tiaj malaltnivelaj fuŝaĵoj. Ekzemple du liniojn poste li uzas la verbon agnoski kun falsa signifo.

A.- Kiu ne kapablis agnoski kiel ege ŝanĝiĝis la mondo dum la lastaj tri jaroj?

Cl.- En PIV li estus malkovrinta, ke agnoski signifas

A.- Deklari ion oficiale rajtigita.

Cl.- Li volis verŝajne diri:

A.- Kiu ne kapablis vidi aŭ konstati kiel ege ŝanĝiĝis la mondo dum la lastaj tri jaroj?

Cl.- Tiu propozicio finiĝas per demanda punkto, kvankam ĝi ne havas demandan rolon. Ĉiuj lernis, ke post prepozicio ne sekvas akuzativo, sed nominativo. Tamen Norman BERDICHEVSKY diras:

A.- Antaŭ tri jarojn ; la forigo de la dekmil statuojn de Lenin, ktp.

Cl.- La refleksiva pronomo estas fuŝuzata, vortoj estas uzataj kun nedivenebla signifo. Tio komprenigas al vi la fuŝnivelon de tiu letero, kiu tutcerte ne estis submetita al Fondaĵo Ivo Lapenna. Gramatike, stile, sed ankaŭ koncerne la agadon mem d-ro Norman BERDICHEVSKY estus ricevinta konsilojn de d-ro Klaus PERKO.

A.- Ofte ni ricevas tiajn fuŝaĵojn de izoluloj, kiuj opinias sin rajtigataj agi nome de la esperanto-movado. Kial dediĉi tiom da atento al tiu ĉi?

Cl.- Por foje atentigi niajn aŭskultantojn pri la malhelpoj, kiujn tiuj fuŝuloj alportas al nia movado. Se homo batalis kontraŭ tiuj nekompetentuloj, tio estas Ivo Lapenna mem. Kaj plorinde estas, ke por advokati lian rehonorigon ĝuste ekagadas unu el tiuj fuŝuloj.

A.- Nenio nova sub la suno!

Cl.- Ivo Lapenna devas moviĝi en sia tombo.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al siaj karaj geaŭdantoj: Ĝis la reaŭdo!